Celaro

La Centro Ludoviko Zamenhof bazas sian celaron sur la agado de ĝia patrono. Ludoviko Zamenhof estis konvinkita, ke la ĉefa kaŭzo de miskomprenoj kaj kvereloj inter homoj estas "komunik-perturboj". Rimedo kontraŭ tio estis nova lingvo, universala komunika platformo, kaj tiel kreiĝis Esperanto. En lia ideo facile retroveblas fundamento de pensado pri interkompreno super etnaj, religiaj, historiaj, kulturaj kaj geografiaj dividoj. Zamenhof havis vizion pri la mondo, en kiu - almenaŭ ideale - ni nun vivas. Li deziris multnacian komunumon, kiu ne detruante karakterojn de la lokaj komunumoj ofertas la eblecon de sukcesa dialogo, interŝanĝado de informoj, ideoj, teknologioj, disvolvado de ekonomia kaj kultura kunlaborado.

Ĉiuj agoj de la Centro rilatas al siaspeca ĉelimejo - de kulturoj, mondkonceptoj, kredoj, nacioj kaj seksoj. La ĉelimejo vivigas arton, kiu estas perfekta medio por malferma, sincera kaj ofte malfacila dialogo. Ebligante la dialogon kaj nuligante komunikajn perturbojn la Centro strebas al malfortigo, kaj estonte - nuligo de baroj kaŭzitaj de natura timo je nekonataĵoj.

Grava parto de la agado de la Centro estas edukado. En ĝi troviĝas porinfanaj okupoj pri la persono de Ludoviko Zamenhof, pri la lingvo Esperanto, larĝsenca multkulturismo, historio kaj tradicio de la urbo. La edukadon helpas modernaj teknikoj kaj pedagogiaj helpiloj laŭ la ideo de instruado pere de ludo.